

.../...

compris la nécessité : c'est pourquoi notre bulletin lance aujourd'hui un appel à ceux qui n'ont pas jugé utile d'adresser leur adhésion à I.K.U.E., ou de renouveler leur contribution annuelle. C'est un devoir de soutenir une revue chrétienne qui est et doit rester un exemple de tenue, d'intérêts, de sérieux parmi tout ce qui s'imprime en Espéranto.

Mais cette union ne se situe pas seulement sur un plan matériel : Elle constitue le cadre d'une solidarité avec tous les chrétiens avides de connaître ceux de nos terres d'Occident; il y a ceux qui sont l'exception et la minorité dans les peuples où la foi n'a pas encore pénétré dans la culture et les relations sociales, il y a ceux qui souffrent du cloisonnement que leur impose un régime politique... Lutte pour l'Homme, pour le respect de la personne humaine, pour le droit, pour la paix ? Notre mouvement nous offre un moyen pacifique pour suivre la ligne tracée par Jean-Paul II depuis son accession au Pontificat, en rappelant que seul Jésus-Christ peut lui donner sa pleine dimension à la fois humaine et divine.

I.K.U.E. attend de tous non seulement intérêt et sympathie, mais aussi une participation active et généreuse.

R. Cl. COLAS .

XXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXX

UNE LANGUE INTERNATIONALE POUR LE MONDE ET POUR L' EGLISE

La tre bone dokumentita libro de P. Korytkowski ĵus aperis en sia franca versio, tradukita de nia dumviva membro André Ribot kaj kompilita de nia religia konsilanto P. Bourdon. Ĝi tute bone taŭgas por informi la religiajn mediojn pri la lingva problemo kaj ties solvo per la Internacia Lingvo Esperanto. Mendu ĝin por vi mem, viaj familianoj kaj amikoj ĉe: P. Bourdon 7, av. Salomon 59000-LILLE. Prezo: 10 F + 20% por sendokostoj.

Ĝi estos ankaŭ aĉetebla dum la kongresoj en Lille (nacia kaj katolika).

Malavare subtenu la eldonan fاندuson (v. p. 6). Antaŭan dankon al la donacoj.

* * * *

HODIAŬ MI KREDAS

Sinjoro, Vi ĉiam donis al mi
la morgaŭan panon,
kaj, kvankam malriĉa,
hodiaŭ mi kredas.

Sinjoro, Vi ĉiam difinis
mian morgaŭan vojon;
kaj, kvankam ĝi estas kaŝita,
hodiaŭ mi kredas.

Sinjoro, Vi ĉiam parolis al mi
kiam la horo estis taŭga;
kaj, spite vian silenton,
hodiaŭ mi kredas.

Sinjoro, Vi ĉiam estis
mia fidela amiko;
kaj, spite de kiu perfidas Vin,
hodiaŭ mi kredas.

Sinjoro, Vi ĉiam plenumis
Viajn promesojn;
kaj, spite de kiu dubas,
hodiaŭ mi kredas.

Liturgio de la reformita eklezio.

=====

NOVAĴOJ EL ITALUJO - RADIO ROMA - ESPERANTO

Teksto de CARANDINA, traduko de Antonio de SALVO

" LA ORAĴISTA BUTIKO "

La itala radio baldaŭ elsendos eksterordinaran dramon: "La oraĵista butiko". Temas pri eksterordinara verko, ĉar ĝi estis skribita de Papo Wojtyła antaŭ ĉirkaŭ 20 jaroj, kiam li estis episkopo de Krakovo.

Dum la nazia okupado de Pollando, la tiam juna Karol Wojtyła iĝis, interalie, animanto de aktora grupo, kiu, ludante poeziajn kaj teatrajn tekstojn, ofte gastigite en la diversaj hejmoj, intencis ekzalti la valorojn de la pola kulturo kontraŭ la potencaj streboj de la naziistoj ĝin neniigi.

La dramo verkita de Papo Wojtyła pruvas, ke oni povas kunigi arton kaj politikon, kaj kunfandi, sen artifiko aŭ retoriko, artajn kaj etikajn valorojn.

"La oraĵista butiko" estas poezia kroniko de tri amhistorioj, kiuj interplektiĝas: la gefianĉiĝo kaj la geedziĝo de du gejunuloj; la amara travivaĵo de mistrafa geedziĝo; la dramo de la gefiloj naskiĝintaj el la paro. La persono de la oraĵisto, kiu ĉeestas en ĉiuj tri partoj, envolas la diversajn momentojn de "drama meditado", kaj portas ĝis la plej alta esprimnivele la filozofian kaj teologian penson de la aŭtoro.

La radia realigo de la dramo, publikigita en Pollando en 1960 sub pseŭdonimo, estos prizorgita de pola reĝisorino, Aleksandra KURCZAB, kiu ludis kiel aktorino en la krakova grupo fondita de Karol Wojtyła.

=====

ANONCOJ

- 1) La turisma oficejo en Nancy eldonis novan 10-paĝan ilustritan prospekton tute en Esperanto. Ricevebla senpage ĉe: Turisma oficejo - 14, place Stanislas 54000-NANCY
- 2) Por prilaborata "Enhavbibliografio de esperantaj periodaĵoj 1887-1978", ĉiajn malnovajn Esperanto-gazetojn serĉas: Edward Wojtakowski P.O.Kesto 312 50-950 WROCLAW 2 POLLANDO Rekompenco.

3) Ricevinte la regulan permeson de la afabla vidvino de la tradukinto, la libro-fako de LITERATURA FOIRO intencas represi en 1979 INFERON de Dante en traduko de Prof. Kolomano Kalocsay. Mendante tuj, per ĉi tiu folio, vi pagos nur 19 svisajn frankojn, kun 33% rabato okaze de mendo de almenaŭ 3 ekz. Post la apero de la verko, en limigita eldonkvanto, la prezo estos rimarkinde pli alta. Sendu la mendilon al LITERATURA FOIRO, BP 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds.

Mi mendas ... ekz-ojn de la represota INFERO, kaj promesas pagi tuj kiam aperos en LF anonco pri la eldono.

Mia adreso:

Dato kaj sibskribo:

(+ 10% pro sendokostoj)

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNVENO DE LA 11-a DE MARTO 1979

*

Ĉeestis: P. Bourdon, F-to Marmou, S-inoj Michau kaj Vincent, F-inoj Preux kaj Vanneau, S-roj Despiney kaj Véron.

Petis senkulpigon: S-to Degrelle, S-roj Bessière, Colas kaj Villeneuve.

Ni preĝis por la ripozo de la animo de la patro de S-ro Bessière kaj por Katerina Villeneuve, kiu hodiaŭ ricevas la konfirman sakramenton.

Preparado de la FKEA-kongreso en Lille (29/4-1/5/79) La ĝenerala sekretario informos M-ron GAND, episkopo en Lille, kaj invitos lin viziti nin. Li ankaŭ skribos al P. Degrelle, por ke li provizu la libroservon per kantikaroj, necesaj por la preparado de la diservo.

IKUE-kongreso en Luksemburgo. Denove ni decidis pristudi proponon de FKEA al IKUE. Tion ni pritraktos dum la kongreso en Lille.

Libro "Une langue internationale pour le monde et pour l' Eglise". P. Bourdon montras ekzempleron, kiu kontentigas ĉiujn. Ni esperas, taŭge uzante tiun verkon, konvinki pri Esperanto homojn al kiuj ni vendos aŭ donacos ĝin.

Esperanto en Lourdes. Aperis artikolo de P. Bourdon en EK de februaro 1979. P. Bourdon parolis pri la agado de P. Manteau-Bonamy, direktoro de la bulteno "La mission de l' Immaculée", kies sidejo en Lourdes nun povas informi pri Esperanto. Li sugestas hispanan-francan kongreson en Lourdes en 1981. Pri tio la sekretario skribos al S-to Casanoves.

Esperanto en la gazetaro. Sufiĉe ofte aperas artikoloj pri Esperanto, ĉefe en la regionaj ĵurnaloj, ankaŭ en katolikaj kiel "La Croix", "Le Journal de la Paix"...

Ekstera agado de la ano. Por paroli nur pri la komitatanoj, en la sino de UFE, oni povas substreki la agadon de P. Bourdon en Lille, de P. Degrelle en Nancy, de S-ino Vincent en Baugé, de S-ro Despiney en Paris. Laŭ peto de S-ro Despiney, F-ino Vanneau konsentas helpi en la UFE-sidejo.

Niaj financoj. (v.raporton ĉisube) La kasistino rimarkigas, ke la elspezoj superas la enspezoj. Ŝi legas leteron de S-ro Villeneuve, kiu proponas plurajn solvojn por altigi la enspezojn. Ni pritraktos tion en Lille.

Diversaĵoj. F-to Marmou informas, ke, pro ŝanĝo de la adresmaŝino, li de nun sendos la bultenon en kovertoj, kaj ke tio estos iom pli kosta.

P. Bourdon atentigas pri juna Laosano, kiu bezonas helpon.

La venonta komitatkunveno okazos dum la kongreso en Lille.

Protokolis R. Despiney.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

FINANCA RAPORTO POR LA JARO 1978

ENSPEZOJ

ELSPEZOJ

Kotizoj	1 666,00
Donacoj	451,50
Profito kongreso Tours	421,50
Rentumo ŝparkaso	79,10
	<u>2 618,10</u>

Bulteno, informiloj	1 843,40
Korespondado	333,45
Vojaĝoj	895,95
Diversaj	<u>184,60</u>
	3 257,40


En la kaso la 1/1/78: 1 868,83

Negativa saldo: 639,30


Pozitiva saldo la 31/12/78: 1 229,53

Bonvolu korekti
la "A 1" solvon, kaj legu :


La duono de  estas 




A 11




A 12




A 13 (1)



A 13 (2)



A 14



P 10


P. 10 a - Per la kvin pecoj, faru kvadraton

P. 10 b - Formetu la kvadratan peceton, kaj sen ĝi, faru denove kvadraton

P. 11 - Per la kvin pecoj faru la literon

H

P 11



BIBLIAJ NOMOJ (daŭrigo)

ABSALOMO (Patro estas paco)

Ambicia belulo kun amata fratino
Sendube vi plenrajtis buĉi fraton rebate
De fimalhonorigo agita renegate:
Ne estis plaĉulino nur senkosta putino!

Sed kial post kunpatra repaciĝo, en halucino
Vi proklamis vin reĝo okupante pirate
La davidan ĉefurbon kaj eĉ senpietate
Atakis propran patron en malfila kulmino?

Ĉu ankaŭ vi forgesis, ke murdon alvokas murd'
Senkompate kaj certe? Jen la morta profilo
Desegnita de Joab' pro ege venĝema surd'.

Restas al Salomonid' ĉe nova kormutilo
Ripeti plorsingulte samkiel trenvoĉa gurd':
"Mia filo Abŝalom', Abŝalom' mia filo".

7/2/1978

ADAMO (ruĝa tero, homo)

Komence de l' komenco el la ruĝa vivoter'
Aperis sub la lumo por vivi en la amo
Diido pretnaskonta alnomita Adamo,
Kies celo donita estis la mondokonker'.

Sed kial do vivanta de la kreada esper'
Vi efikis disigon en malobea dramo,
Suĉante kun la edzin' frukton el arba mammo,
Malfile respondante al la patreca ofer'.

Memoru, ke en dezert' silentas la serpento
Kaj ruzante senbrue pikmortigas kun ĝuo
Alportante malĝojon kun ankora turmento.

Sed kuraĝu postpeke en via splenvakuo:
Leviĝos matena sun', verdiĝos Testamento,
Alvenos ĉe l' horizont' novadamo: Jesuo.

DEGRELLE Roger 8/2/78 (daŭrigota)

Se mi ĉiam prenis la tempon por ridi
Mi neniam konus la ĉagrenan tempon.
Se mi ĉiam havus la tempon por ludi
Mi neniam spertus la enuan tempon.
Se mi ĉiam vartus la tempon por frati
Mi neniam uzus la koleran tempon.
Se mi ĉiam flegus la tempon por ami
Mi neniam forus la tempon por sami
Al Vi, Sinjor'
Amanta kor'.

DEGRELLE Roger.

ELDONA FONDUŜO

Kiel vi legis en la protokolo sur p. 4, la libro de P. Korytkowski estas preta,
sed ni devas finpigi la eldoniston. La fonduso daŭre akceptas donacojn. Por 1979,
ĝi jam ricevis: 1) S-ro Lecocq: 38 F; 2) S-ro Despiney: 100 F; F-ino Le Boëdec:
50 F. Sume: 188 F. Plej sinceran dankon al niaj amikoj.
Association catholique française pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2324 93 N.

Mi atendas trankvile
 La printempan alvenon
 Dum la neĝo subtile
 Disvolvadas kurtenon
 Blankan. Tamen en ĉielo
 Inter nuboj nigroplenaj
 Klaras flava sunohelo
 Kiu kise al satenaj
 Miaj vangoj anoncas
 La tuj preton de l' tero
 Al vekiĝo, prononcas
 Pri la fin' de karcero
 Frosta. Suno, por sereni
 En sia task' akurate
 Streĉe agas por vivteni
 Vintre, patra plej komplate.

Roger DEGRELLE.

+++++

INSTRUKCIOJ POR LA BALOTADO

Enŝovu la voĉdonilon en koverton kun indiko "voĉdonado FKEA". Tium sigelitan koverton enmetu en alian koverton sendotan al la sekretario antaŭ la 20-a de aprilo Dorsflanke de ĉi tiu lasta, skribu vian nomon por la kontrolo.

RAJTIGILO

sendota al la sekretario antaŭ la 20-a de aprilo se vi ne partoprenos la kongreson

Mi subskribinte (kompleta nomo)

me povante partopreni la kongreson en Lille, rajtigas voĉdoni je mia nomo por ĉiuj decidoj favoraj al FKEA.

Antaŭ ol subskribi, aldonu permane "Bon pour pouvoir"

Dato kaj subskribo:

VOĈDONILO

sendota al la sekretario antaŭ la 20-a de aprilo eĉ se vi partoprenos en Lille

- | | | | |
|-------------------------------------------|-----|----|-----------|
| 1. Ĉu vi aprobas la nunan agadon de FKEA? | JES | NE | SINDETENO |
| 2. Ĉu vi aprobas la finanĉan raporton? | JES | NE | SINDETENO |

RENOVIGOTA KOMITATTRIONO

- P. DEGRELLE Roger (Nancy)
- F-to MARMOU René-Jean (La Houssaye-en-Brie)
- F-ino VANNEAU Emilienne (Paris)
- S-ro VILLENEUVE Georges (Saint-Chéron)

Forstrekuj la sendeziritaĵojn.

KOTIZTABELO 1979

IKUE kun "Espero Katolika" 48 F
Peranto: R. Degrelle c.c.p. NANCY 2555 38 L.

* * * *

ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto" 12 F
Infanoj ĝis 16-jaraj, pastroj, religiul(in)oj 6 F
Bonfaranto 60 F
Dumviva membro 240 F

UFE kun "Revue Française" 80 F
UEA kun "Esperanto" kaj Jarlibro 110 F
Assoc. Cathol. Franç. pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2324 93 N.

Abono al "Biblia Revuo" 35 F
Peranto: G. Baudry c.c.p. LILLE 4704 43.

+++++

Dépôt légal: 2ème trimestre 1979 !!! Polycopié par F. M. C.
Papier de presse n° 34 745 !!! Prieuré St-Martin La Houssaye-en-Brie
Directeur-gérant: Gaston Véron !!! 77610 - FONTENAY TRESIGNY FRANCE